


sub la suda kruco ★
septembro 2016

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIIOJ

Volumo 24 [3] numero 124 – septembro 2016

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de novembro 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.


SUR LA KOVRILO: Indrani Beharry-Lall en 1983



5. Adelajda festivalo ankaŭ ĉi-jare



7. Universala Kongreso 2016 en Nitro, Slovakujo



9. La aminda hundeto



12. Indrani - la Esperantistino



17. Ĉu estas tro da turistoj en Nov-Zelando?



21. Robert Budzul 4/2/1957 - 9/7/2016

25. La transvivado de kulturoj

28. Ateismo nun maldefendebla

septembro, du mil dek ses

En julio mi iris kun mia familio al Melburno por ferii dum kelkaj tagoj. Tie mi profitis la okazon por renkonti mian kunredaktoron, Jo, kaj aliajn lokajn samideanojn. Ĉiam estas plezuro renkonti aliajn esperantistojn en fremda lando kaj povi interbabili pri diversaj aferoj.

Melburno estas tre bela urbo kaj similas al Velingtono pro la kultura vivo kaj multaj kafejoj. Ĉiĉerono de ekskurso en kiu ni partoprenis diris ke kaf-maŝino troviĝas je ĉiuj 50 metroj en la urbcentro! Laŭ tio kion mi povis vidi en mia promenado laŭ melburnaj stratoj, mi kredas ke li pravas.

Estis tre interesa la muzeo pri migrado en Melburno, pri enmigrintoj al Aŭstralio el diversaj landoj kaj kulturoj. En la sama muzeo estas ekspozicio ankaŭ pri rasismo – bedaŭrinde tiu problemo ekzistas. Mi legis en la muzeo ke ĝis antaŭnelonge la plej granda grupo de enmigrintoj al Aŭstralio estis ... nov-zelandanoj!

Dum multaj jaroj pli da nov-zelandanoj elmigris al Aŭstralio ol enmigrantoj el Aŭstralio

al Nov-Zelando. Tiu estis granda socia kaj ekonomia problemo por ni, sed nun tiu situacio estas tute diversa kaj nia enmigrado el Aŭstralio kaj aliaj landoj tre rapide kreskis. Oni eĉ plendas nun ke venas al Nov-Zelando tro da enmigrantoj kaj turistoj. Legu iom pli pri tiu temo en artikolo en paĝo 17.

Mi dankas denove al niaj regulaj kontribuantoj. Ŝajnas, laŭ mia scio pri aŭstralia geografio, ke esperantistoj en Sud-Aŭstralio estas tre verkemaj. Ĉu niaj legantoj en aliaj ŝtatoj ne volas sendi kontribuojn?



David Ryan kaj Joanne Johns, kunredaktoroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*

Adelajda festivalo ankaŭ ĉi-jare

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Estis Sandor Horvath kiu komencis kaj persiste daŭrigas la organizadon de Lingvaj Festivaloj en sia laborloko, Thebarton Senior College (Torrensville, Adelajdo). Temas pri lernejo kun proksimume mil studentoj, inter kiuj granda procentaĵo estas enmigrintoj lernantaj la vivnecesan anglan. Estas nobla ideo iomete paŭzi en la gravigo de la lernata lingvo kaj direkti la atenton al la bunto de naciaj lingvoj. Multaj studentoj de Thebarton venas el landoj suferantaj ekonomiajn malfacilaĵojn aŭ militon sed, malgraŭ ĉio, tiuj landoj estas kaj restos hejmlandoj de la formigrintoj, forfuĝintoj.

La 22-a de junio estas Internacia Tago de Rifuĝintoj kaj, tial, taŭge elektita por okazigo de aranĝo dum kiu la diversdevenaj studentoj de Thebarton povas prezenti la bazan elementon de sia kulturo: sian lingvon. Memoru ke temas pri ankoraŭ ne flua angla kaj ofte manko de spertoj pri publika



Sandor eksplikas: Jen "Lingva Kvizo" dum la Lingva Festivalo en mia lernejo. 7 instruistoj sidis en vico, rigardante la 450 studentojn en la halo, ne vidante la podion. 56 studentoj venis al la podio kaj parolis sian lingvon dum 15-30 sekundoj. La instruistoj penis diverŝajn nomojn de la lingvo. Ili fajfis per fajfilo por indiki ke ili eble konas la lingvon. Esperanto estis unu el la lingvoj.

parolado. Tamen, la kuraĝuloj kun fiero parolis pri sia kulturo kaj montris la elementojn de sia denaska lingvo: la alfabeton, iom el la gramatiko, kelkajn vortojn kaj frazojn. Ĉi-jare estis prezentitaj “nur 28 lingvoj” diris Sandor. Se rigardi la pozitivan flankon de la “malmultaj” pritraktitaj lingvoj, tiamaniere pli da homoj ĉeestis la unuopajn prezentaĵojn ne dissplilitaj al amaso da malgrandaj grupoj.

Kompreneble, grava ero de la

aranĝo estis la prezento de Esperanto. Estis tute nekutime ke faris ĝin ne-esperantisto aŭdinta pri Esperanto nur mallonge antaŭ la festivalo, kompreneble de Sandor mem. Temas pri juna ĉinino, Min Lin, kiu certe meritas laŭdon pro ŝia helpemo kaj kuraĝo. Ŝian prezentadon ĉeestis trideko da homoj. La ĉeestintaj esperantistoj, Sandor kaj Michael Carney, estis kontentaj kaj ni povas gratuli al la organizanto pro bone farita laboro.



Universala Kongreso 2016 en Nitro, Slovakujo

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

La enloĝantoj de Nitro malfermis siajn brakojn por bonvenigi partoprenantojn de la 101a Universala Kongreso de Esperanto.

La kongresejo situis en la universitato kaj aliaj proksimaj lokoj. Ĉirkaŭ la urbeto, multaj standardoj flirtis el stangoj, multaj buntaj afiŝoj proklamis la kongreson. En varma vetero ni ĝuis la etoson de la urbeto kaj ĉirkaŭaĵoj. Danke al la loka registaro publika transporto estis tute senpaga por kongresanoj kaj taksiaj kostoj estis tre malaltaj.

Ni havis la uzon de la ĉefplaco por la Nacia Vespero kaj Internacia Vespero kie la loka loĝantaro povis ĝui la buntan Esperantan etoson. Ambaŭ koncertoj estis ege ĝuindaj, kun tradiciaj kaj modernaj muziko kaj dancoj.

La paroladoj dum la kongreso, kiel kutime, estis plenaj je interesaĵoj



Heather kafumas



La enirejo de la kongresejo



Partoprenantoj de la antaŭkongresa ekskurso



La ĉefplaco de Nitro



La malferma ceremonio



La futbala matĉo inter Slovakio kaj Esperantujo

kun temoj diversaj, kiel prelegoj pri Slovakujo, japanaj artoj, socia justeco, lingva justeco, lingvaj kursoj kaj ekzamenoj, la aŭstralia politika sistemo (de Trevor Steele), ktp. Ĉiun tagon ni ankaŭ ĝuis muzikajn grupojn kaj teatraĵojn.

Post la grupa foto farita per virabelo (senpilota flugmaŝineto) estis manifestado kaj ni ĉiuj promenis aŭ dancis tra la stratoj ĝis kiam ni atingis la ĉefplacon, kie oni instruis la slovakon tango-dancon kaj rekordis mondan rekordon de dancistoj.

Finfine mi raportas ke la kongreso en Nitro estis granda sukceso kun multaj oportunoj sperti la slovakon vivmanieron kaj kulturon, kaj renkonti malnovajn amikojn kaj fari novajn amikojn.



Trevor Steele prelegas pri la aŭstralia politika sistemo

Esperanto-parado tra Nitro





La aminda hundeto

BOB FELBY (ADELAJDO)

Loĝis viro en domo. Multaj viroj, jes ankaŭ virinoj, loĝas en domoj, kvankam ankoraŭ multaj homoj tion ne faras ĉar registaroj ne havas sufiĉe da mono por loĝigi ĉiujn. Tio estas bedaŭrinda, sed ni devas kompreni ke ili bezonas ja multajn milionojn, jes, eĉ bilionojn da dolaroj por la imagata danĝero de malamiko kiu ekzistas nur en ilia imago. Kaj, krom tio, ili mem ja meritas eĉ pli da mono, ĉar ili ja faras tiom por protekti nin kontraŭ la imagita malamiko, ĉu ne, kaj ankaŭ por ebligi al ni ĉiuj pli bonan edukadon kaj flegadon en diversaj malsanulejoj kiuj ĉiam estas tro plenaj por akcepti pli da malsanuloj. Sed, kiel jam dirite,

“pli gravas subteni militojn kaj malamikecon ol ion ajn alian!”.

Tamen, por reveni al tiu ĉi ege interesa historio, viro loĝis en domo. Li estis preskaŭ tute sola en la mondo, kvankam li havis multajn bonegajn geamikojn. Sed multaj el ili loĝis en aliaj landoj, bonaj kaj belaj landoj, sed malproksimaj landoj.

Tiu viro, ĉu ni nomu lin la heroo de tiu ĉi historio, havis hundon. Ne grandan hundon, fakte hundeton. Kaj ĝi estis blanka, precipe tuj post kiam ĝi estis ĝuinta sian duŝadon en la banĉambro de la domo en kiu la heroo de tiu ĉi historio loĝis. Sed tio kompreneble ne okazis ofte, fakte ne sufiĉe ofte. Sed, ankaŭ tia la vivo

povas esti.

La viro kaj la hundo manĝis kune, sed la manĝaĵo de la viro estis sur la tablo dum tiu de la blanka hundeto estis sur la planko, sed tamen sur speciala porhunda telero. La hundo ĉiam finis la unua kaj tial helpis la viron fini lian manĝaĵon.

Nu, eble vi neniam pensis pri tio, sed la intestoj de hundoj estas multe pli mallongaj ol tiuj de ni homoj. Tial la manĝaĵo de hundoj ne restas tre longe en la stomako de hundoj. Tial, ili devas iri al la necesejo preskaŭ tuj post la manĝado. Tio estas bona, ĉar la manĝaĵo de hundo plejparte konsistas el viando kiu estas la karno de alia besto, sed mortinta tro baldaŭe post sia naskiĝo. Tial hundoj plej ofte estas multe pli sanaj ol ni homoj, kies intestoj estas treege longaj, eĉ longegaj, kaj kiel vi jam scias (se ne, vi scios tre baldaŭe) ke la mortinta karno de besto tre rapide putriĝas kaj tio kaŭzas kanceron en la vivanta korpo de la homo kiu ne estas konstruita por manĝi karnon. Sed hundoj rajtas tion fari!

Tial, nia heroo neniam fermis la malantaŭan pordon de sia domo. Li tre ŝatis sian etan blankan hundeton, kaj ne volis ke ĝi devu fari siajn necesajojn en la domo.

Sed, jen tio kio okazis. Kiel vi scias, en la naturo troviĝas multaj aliaj vivantaj estuloj ol nur homoj kaj etaj blankaj hundetoj. Troviĝas ankaŭ la treege belegaj mevoj, turtoj, pigoj, merloj, paseroj, kokoj, anseroj,

anasoj kaj tiuj iom pli grandaj ol anasoj, la emuoj! Ili ĉiuj rajtas je la vivo sur la tero, sed necesas ankaŭ al ili manĝi, manĝadi, jes eĉ manĝegadi!

Kaj, ĉar birdoj certe ne estas stultaj, ili tre rapide lernis ke sur la planko de la lavejo en la domo de la heroo de ĉi tiu interesa historio, troviĝas eĉ multe da hundomanĝaĵo, kio certe kaj sendube bongustas al iu ajn birdo. Tial, precipe dum la noktoj, kiam la heroo kaj la blanka hundeto dormis, aŭ almenaŭ la heroo dormis, eniris tiuj multaj birdoj, tamen ne tre ofte la emuoj, sed anasoj kaj anseroj, por ĝui la manĝaĵon restintan sur la planko de la lavejo. Ankaŭ birdoj rajtas ja vivi, ĉu ne?

Sed tion ne pensis la blanka hundeto de la heroo. Ĝi opiniis ke la tuta domo apartenas al ĝi kaj ke, precipe kiam la du enloĝantoj dormas, neniu rajtas eniri. Tial, ĝi elsaltis el la lito de la heroo, kuregis en la lavejon kaj provis ĉasi, ja eĉ mortigi kaj manĝi tiun, kiun ĝi ĵus mortigis. Same kiel multaj homoj agas, ĉu ne? Feliĉe la birdoj plej ofte sukcesis forflugi, sed bedaŭrinde ne ĉiam. Tiam la blanka hundeto portis la kadavron en la dormoĉambron kaj ekmanĝis ĝin. Kia kanibalo, ĉu ne? Tute same kvazaŭ ĝi estus homo!

En la mateno nia heroo balais kaj lavis la dormoĉambran plankon. Tiam li, de tempo al tempo, trovis amason da plumoj, kiujn li

kompreneble ĵetis en la rubujon, sed ofte ankaŭ tutan mortintan korpon de ĵus vivanta belega birdo, nun priplorata de edzo kaj idoj. Se nia heroo ne tuj purigus la plankon de la dormoĉambro, ekestus terure fiodoranta haladzo en tiu ĉi ĵus menciita kaj grava ĉambro.

Sed tamen, ĉar neniu estas perfekta, iun nokton kiam la heroo malfrue revenis de Esperanto-kunveno en la urbego, li deziris ioman manĝaĵon kaj trinkaĵon antaŭ ol enlitiĝi. Facile farite, ĉu ne? Sed tiuj el vi, kiuj havas, aŭ iam havis, hundon, ne gravas ĉu ĝi estas blanka, griza, nigra ktp. kaj ankaŭ ne gravas kian grandecon ĝi havis aŭ havas, vi bone, eĉ bonege scias, ke tute ne eblas sidi trankvile trinkante unu tason da kafo samtempe manĝante kelkajn biskvitojn. Via hundo fortege deziregas preni parton en la festeno. Treege laŭtege ĝi per siaj belegaj kaj grandegaj okuloj postulas de vi ankaŭ iom da manĝaĵo. Kaj nia heroo tre donaceme donacis al sia blanka hundeto kelkajn biskvitojn kaj ankaŭ, ĉar la hundeto tion ege ŝategis, iom da bongusta, almenaŭ laŭ la hundeto, ajlopano. Iom poste ili ambaŭ treege lacaj enlitiĝis kaj ekdormis. Iom poste li vekigis. Ree la ĉambro fiodoraĉis terure. Li pensis: “Tio estas, ĉar mi lasas la malantaŭan pordon malfermita. Tiuj tro multaj fifabrikaĉoj en la havena kvartalo venenigas la aeron, kiun ni devas enspiri. La registaro

devus malpermesi tion. Iom poste li pensis, ne, kompreneble ne estas la fifabrikaĉoj kiuj fiodoras, mia blanka hundeto lasis kadavron de mevo, turto, pigo, merlo, pasero, kokino, anaso, certe ne emuo en nia dormoĉambro.

Li ellitigis sin kaj ŝaltis la lumon. Lia domo havis elektran lumon. Li rigardis en ĉiujn angulojn de la dormoĉambro kaj eĉ sub la liton, timante ke tie kuŝas la mortinta korpo de emuo putranta kaj plena de larvetoj blankaj. Sed, estis strange, li nenie trovis kadavron de io aŭ iu ajn. Li do reenlitigis sin kaj malŝaltis la lumon. Lia blanka hundeto saltis sur la liton kaj la heroo refoje ekdormis, ĉar li estis treege laca, eĉ lacega.

Sed tiam li refoje vekigis pro tiu sama veneniga fiodoraĉo. Li pensis ĉu la blanka hundeto nun estas kaptinta mevon, turton ktp. ktp. Se jes, ĝi ankoraŭ ne devus fiodoraĉi. Devas esti io alia. Refoje li provis endormiĝi. Tiam aŭdiĝis el ie sur la blanka hundeto sono kiun ni ĉiuj ne povas miskompreni, aŭ ĉu? Eble iuj el vi povus, sed nia heroo nun bonege sciis, de kie la terura fiodoraĉo venis, sed pro sia amo al la ĉarmega blanka hundeto, li simple karesis ĝin kaj ili ambaŭ endormiĝis. Kaj la heroo tiun nokton dormegis longe, eĉ longege pro la endormiga fiodoraĉo de la intestaj gasoj elvenintaj el ie sur la ĉarmega blanka hundeto!

Indrani – la esperantistino

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Temas pri Indrani Beharry-Lall, virino kiu estas granda mondvojaĝanto, kiu tre ŝatas muzikon kaj dancadon, florojn kaj floraranĝadon, ĝis antaŭ kelkaj jaroj ofte biciklis, daŭre multe legas, engaĝiĝas en UNESKO-subteno, naturprotektado, konversacias en la angla kun novaj enmigrintoj ktp. Sed nun ni parolu pri Indrani, la esperantistino. Unue kelkaj bazaj detaloj pri ŝi.

Indrani naskiĝis en San Nicolas en la insulo Aruba, tiam nederlanda kolonio en la Kariba maro. Ankoraŭ ne 16-jara ŝi ekstudis en Nederlando, 19-jara transloĝiĝis al Londono, kie ŝi studis kaj diplomiĝis kiel optometristo. Sekvis tri jaroj en Gujano kaj de 1970 Vankuvero, Kanado. Al Aŭstralio ŝi venis unue en 1988 kun 2-jara laborvizo sed, ĉar ŝi estis kontenta kaj ŝatis la landon, ŝi decidis enmigri kaj post la emeritiĝo definitive resti en Adelajdo.

Vi estas bone konata persono en la aŭstralia Esperanto-pejzaĝo, fakte tuj post via alveno vi eniris la lokan Esperanto-rondon. Sed kie komenciĝis la afero?

En 1972 en Vankuvero. Mi vidis reklamon pri 10-semajna vespera E-kurso, aliĝis al ĝi, finis ĝin kaj poste unu foje monate iradis al la loka klubo. Mi ankoraŭ ne tre bone



parolis Esperanton kiam mi partoprenis mian unuan UK-on en Portland (Oregon) en 1972, sed dum la UK en Beogrado (1973) miaj parolkapabloj komencis pliboniĝi.

Kiam vi sentis vin vere memfida en parolado?

En 1975 mi amikiĝis en la loka klubo kun paro kun kiu mi konstante parolis Esperanton kaj sekve mi ekparolis sufiĉe flue.

Ĉu vi iris ankoraŭ al plia kurso?

En 1982 proksimume mi partoprenis someran kurson en San Francisko. Mi memoras ĝin kiel agrablan sperton kaj kiel mian lastan veran E-lernadon. De tiam mi ne plu studis la lingvon, mi klopodis uzi ĝin kiom eble plej multe. Bona okazo estis partopreni NOREK-ojn (Nord-Orienta Rondo de E-Kunvenoj) kie mi ekkonis kaj amikiĝis kun multaj esperantistoj de Seattle, Victoria, kaj Vankuvero kaj la okcidenta marbordo de Kanado ĝenerale. Mi tre ŝatis tion.





Esperanto speakers Song Jeong-ok (Korea), Indirani Beharry-Lall (Australia), Judita Yamato (Poland), Choi Yun-huy (Korea), Mukunda Raj Pathick (Nepal), Jo Steyaert (Belgium) and Takagi Michiko (Japan).

D o n v e n o n



Kiam venis via engaĝiĝo en la organizaj taskoj de la movado?

Mi memoras multe labori por la dua Pacifika Kongreso, okazinta en Vankuvero (la unua estis en Brisbano). Poste venis la UK-o en Vankuvero (1984)! Mi respondecis pri ĝia arta programo: pri la nacia, internacia, kaj teatra vesperoj, malferma kaj ferma ceremonioj ktp. Necesis mendi pianon, interkonsenti kun artistoj, kaj memoru, tiam ne ekzistis komputiloj kaj, ĉar la telefonado estis multekosta, oni skribis amason da leteroj kaj atendis minimume unu monaton por ricevi respondon!

Ĉu vi ĝuis la kongreson?

Mi ne havis okazon por tio; mian

tempon plene okupis la taskoj kiujn mi devis fari. Sed ĝenerale oni ŝatis tiun UK-on, eĉ se ĝi estis laŭ la nombro de partoprenantoj malgranda. Laŭ mi, ĝuste tio estis la pozitiva flanko de la aranĝo, la “familieca” etoso. Mi mem ne ŝatas iri al grandaj kongresoj.

Post via alveno al Adelajdo ĉu vi baldaŭ kontaktis la lokajn movadanojn?

Mi venis sabate, lunde mi jam partoprenis la jarkunvenon de adelajdanoj kaj tuj iĝis kasisto de la klubo. Krom unu jaro mi plenumas tiun taskon konstante jam la 28-an jaron. Mi menciui ankaŭ ke inter 1992 kaj 1997 okazis en Adelajdo somerlernejoj kaj mi



aktive partoprenis ankaŭ en ilia organizado.

La 82-a UK okazis en Adelajdo.

Ĉar mi memoris mian sperton en Vankuvero, ĉi-foje mi akceptis malpli da taskoj. Nun la respondeca organo estis landa kongresa komitato (t.e. ne nur lokuloj, sed esperantistoj el la tuta lando). Mi havis la taskon de la bonveniga servo, aĉetis florojn kaj zorgis trovi personon kiu transdonu ilin al la surpodiaj artistoj, kaj pluraj aliaj taskoj kiujn nur loka persono povis fari.

Kiom da UK-oj vi partoprenis entute?

Ĝis nun dek unu. Laste la islandan en 2013.

Ni scias ke vi estas granda mondvojaĝanto. Ĉu vi memoras kiam vi uzis Esperanton por vojaĝceloj la unuan fojon?

Jes, en Alasko. Du horojn post mia alveno mi jam estis en la domo de loka esperantisto kaj manĝis glacikremon. Oni klarigis al mi kion indas viziti, kiel atingi la vidindaĵojn, kaj eĉ akompanis min al kelkaj lokoj. La samo okazis en San Francisko. Post la UK en Brazilo mi gastis ĉe nove renkontitaj esperantistoj kaj iris kun ili al pluraj interesaj lokoj. Mi loĝis ĉe esperantistoj en Kopenhago, estis bone traktita de lokaj esperantistoj en Ĉinio, Litovio ktp. De 2009, de kiam mi konstruigis mian propran domon en Adelajdo, mi membras en Pasporta Servo de UEA. Ĉi-maniere ankaŭ mi

povis gastigi kelkajn eksterlandajn vojaĝantojn.

Ĉu la helpo, kiun vi ricevadas dum viaj vojaĝoj, estas la plej grava aspekto de via esperantisteco?

Ne. Al mi pleje gravas renkonti diversajn homojn, ekkoni ilin, amikiĝi kun ili. Ni scias ke esperantistoj estas ne malofte iom strangaj, sed certe ili estas interesaj homoj. En si mem jam tio ke ili interesiĝas pri Esperanto signifas ke temas pri neordinaraj, scivolemaj homoj kiuj estas malfermaj rilate aliajn kulturojn. Mi ĉiam ĝojas interkomuniki kun ili, ili donas al mi novajn ideojn, sciojn, spertojn.

Ĉu vi mem iam instruis Esperanton?

Mi neniam instruis, sed dum iom da tempo mi gvidis konversacian klason. Ekde miaj komencaj E-jaroj mi kasistumis; jam en Vankuvero mi estis kasisto de la loka klubo. Ankaŭ aktuale mi estas kasisto de la adelajdanoj kaj krome mi nun estraranumas en AEA (de 2013). La rolo, en kiu mi neniam estis sukcesa, estas varbanto por Esperanto. Mi klopodis, la homoj ŝajne konsentis kun miaj ideoj, sed ne eklernis la lingvon.

Mi scias ke dank' al viaj diversaj ŝatokupoj kaj interesoj vi renkontas multajn homojn.

Jes, kaj esperantistoj estas tre grava parto de mia amikaro. Mi ĝojas ke mi apartenas al la Esperanta mondo.

Ĉu estas tro da turistoj en Nov-Zelando?

ESPERANTO-RONDO DE WELLINGTON

Nov-Zelando havas problemon, fakte havindan problemon. Kelkaj homoj plendas ke ni havas tro da turistoj. Kiam mi estis knabo, venis ĉiujare malpli ol 1 miliono da eksterlandaj vizitantoj, sed nun venas pli ol 3 milionoj al nia malgranda lando. Memoru ke nia nacia loĝantaro estas nur 4,7 milionoj. Tial, eksterlandaj turistoj reprezentas grandan parton de ĉiuj kiuj promenas laŭ niaj stratoj, vojaĝas aŭtomobile laŭ niaj ĉefvojoj, aŭ manĝas en niaj restoracioj. Aŭstralio ricevas nur 7 milionojn da eksterlandaj vizitantoj (1 miliono estas nov-zelandanoj). Pro tio, turismo estas multe pli grava por Nov-Zelando.

Turismo certe povas esti bona por nia lando pro la multeco da postenoj necesaj por prizorgi niajn vizitantojn: ekzemple, ĉiĉeronoj, doganistoj, interpretistoj, personoj kiuj laboras en hoteloj, flughavenoj, restoracioj, muzeoj ktp. Dank'al niaj eksterlandaj vizitantoj, miloj da nov-zelandanoj havas laboron. Jes, en nia lando kie la turisma sektoro tiom kreskas ke ĝi nun estas preskaŭ pli granda ol la lakta sektoro, plaĉas al ni 'melki' turistojn!

Tamen, lastatempe, kelkaj homoj

plendas pri problemoj rilataj al niaj eksterlandaj vizitantoj. Ekzemple, junaj dorssakuloj dormas en botanikaj ĝardenoj kaj aliaj publikaj lokoj kaj, pro manko da publikaj necesejoj, vi povos imagi ke ... ili banas sin en netaŭgaj lokoj. Ili ne bone kondukas aŭtomobilon, precipe se ili venas el lando kie oni stiras je la dekstra flanko de la strato kaj, pro tio, ili povas okazigi akcidentojn. Junaj turistoj fumas kaj drinkas kaj ili kreas bruon kaj aliajn problemojn (kaj multan laboron por policistoj). Alvenante al niaj flughavenoj, ili povas envenigi malbonajn plantojn aŭ bestaĉojn kiuj povas detrui nian naturan medion, aŭ ili ŝtelas indiĝenajn plantojn el niaj naciaj parkoj.

Kiom estas 'tro' da turistoj? Eble ni povos starigi ĉiujaran limon





kaj, kiam alvenos turisto al nov-zelanda flughaveno tuj post atingo de tiu limo, niaj doganistoj devos diri 'Ni bedaŭras, Nov-Zelando estas nun plena, vi devos reiri'. Ĉu 3 milionoj sufiĉas, aŭ ĉu ni povos bonvenigi ĝis 4 milionoj? Post la baldaŭa fino de la rekonstruado de post-tertrema Christchurch, multaj konstruistoj serĉos laboron. Konstrui novajn hotelojn por pli da turistoj estos bona solvo.

Do, kion fari? Ŝajnas ke ĉiuj volas veni al Nov-Zelando. Milionulo kiu loĝas en ĉarma vilaĝeto apud Queenstown plendas kaj sugestas ke venu nur riĉaj, bonkvalitaj turistoj (vidu www.stuff.co.nz/travel/news/77806483/Keep-Arrowtown-exclusive-target-the-rich-says-Sir-Michael-Hill). Ĉu bona ideo? Tamen, kiel defini bonkvalitan turiston? Ĉu francoj kiuj trinkas vinon sen ebriiĝi? Ĉu riĉaj famuloj el Hollywood kiuj elspezas multan monon? Ĉu nur ne-fumantoj? Ĉu angleparolantoj

kaj homoj kiuj stiras je la maldekstra flanko? Aŭ ĉu nur esperantistoj (jen brila ideo: kial ne okazigi universalan kongreson de Esperanto en Nov-Zelando?). Eble ni povos postuli grandan pagon: kiu volas viziti Nov-Zelandon devos aĉeti vizon je grandega prezo. Tamen, ne maltrankviliĝu - certe ni povos proponi rabaton por niaj aŭstraliaj kuzoj.



ALIĜU NUN!

Vizitu aea.esperanto.org.au/kongreso



2017 AŬSTRALIA
ESPERANTO-KONGRESO

BRISBANO

6a–15a Januaro 2017

**SPECIALA
GASTO: JOMO!**



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Robert Budzul

4/2/1957 - 9/7/2016

KAM LEE (HOBARTO)



Robert Budzul (dekstre) en aprilo 2011 kun Jonathan Moylan, ĉe la "Tuŝo de Azio"-kafejo. La du homoj tenas la T-ĉemizon kiu havas la titolon "Mi longe penis" kaj la komenton "Ne estas kion vi opinias" en la angla, germana, ĉina kaj rusa lingvoj.

Vivante en Melburno en proksimume 2006, mi ricevis mesaĝon de Robert Budzul, kiu deziris informon pri la aŭstralia Esperanta movado. Mi donis al li ĉi tiun informon kaj mi poste trovis, ke li loĝas en Hobarto, kiu estis mia antaŭa hejmurbo dum mi estis juna lernanto. Finfine, mi renkontis lin kaj mi trovis kelkajn interesajn koincidojn. Plej verŝajne, mi renkontis lin antaŭ ol ni iĝis esperantistoj. Ni iris al la sama gimnazio, Newtown Gimnazio en Hobarto, Tasmanio, dum 1971. Mi

studis en la sepa jarnivelo kaj li studis en nivelo du jarojn pli alta.

Alia interesa koincido estas ke Robert konis lokan leteriston Eino Looritz, kiu multajn jarojn poste periode parolis Esperanton al mi. Tamen, estis multaj jaroj post la morto de Eino ke Robert eksciis ke li estis esperantisto. Kvankam mi kontaktis Robert en 2006, fakte tiu ne estas la unua kontakto, sed plej verŝajne estas rerenkonto post periodo de 34 jaroj!

Robert serioze eklernis Esperanton en 2004, kaj poste sukcesis varbi
ESK | paĝo 21 | 124 | septembro 2016

Fotoj (horloĝdirekte ekde supre dekstre):

Vizito de Jennifer kaj Alan Bishop, ĉe "Tuso de Azio"-kafejo. 9/7/2015

4/2/2016. Naskiĝtagfesto de Robert Budzul. En la foto estas esperantistoj kaj membroj de la lingva grupo.

Robert kun kvizgrupo "Esperanto", ĉe la Respublika Hotelo, 2011. La grupo konkursis dum multaj jaroj.

Esperantistoj kaj membroj de la lingva grupo ĉe drinkejo "Lands End".

Foto montrita en la kantfilmeto "Esperanto". Maldekstre sidas Robert Budzul.

Vizito de nepala esperantisto, Indu (en flava T-ĉemizo) ĉe "Tuŝo de Azio"-kafejo. Dekstre de Robert estas Karl, nepo de Roberto. 13/2/2014





Budo de lingva societo, dum la Ekspozicio-Tago, organizita de la Universitato de Tasmanio. 29/2/2012. Esperanta literaturo estis ankaŭ montrita sur la tablo.

junulojn lerni Esperanton. Dum multaj jaroj li organizis Esperantajn kunsidojn kiuj poste ŝanĝiĝis al lingvaj kunsidoj. Robert sukcese faris kvizgrupon, Esperanto, kiu komence konkursis ĉe la Respublika Hotelo kaj poste ĉe la Waratah Hotelo. Aldone al la gajno de publika reklamo, la grupo gajnis kaj monajn kaj materialajn premiojn.

Robert estis unu el la ĉeforganizantoj de la Esperanta Kongreso en Hobarto, 2008. Resumoj de kelkaj el la eventoj estas menciitaj en fruaj numeroj de ESK. (ESK-Nov-Dec, 2008 kaj ESK-Junio, 2009.)

Verŝajne en septembro 2012 Roberto eksciis ke li havas cerban tumoron. Scio pri la tumoru estis sekreto al la ĝenerala publiko, kaj mi eksciis pri la malsaneco nur dum lia funebro.

Mia lasta renkontiĝo kun li okazis la ĵaŭdon antaŭ lia morto dum kunsido ĉe lia domo. Li ne estis parolema ŝajne pro lacego, sed nun pli verŝajne pro la malsaneco. Robert mortis neantaŭvidite en sia hejmo en Battery Point, Hobarto. Mi informiĝis ke li ankoraŭ havas sufiĉajn kontaktlensojn por daŭri ses monatojn.




Prelego de Robert Budzul, "Enkonduko al Esperanto" ĉe biblioteko de Eastland. 15/10/2012.

La funebro de Robert okazis en Hobarto kaj multaj homoj ĉeestis. David Walsh, tre bona amiko de Robert, kaj posedanto de la fama MONA-muzeo en Tasmanio estis la ĉefparolanto de la evento.

David menciis pri siaj aventuroj kun Robert en Eŭropo. Unu anekdoto estas ke, dum ilia vizito al Finnlando, li veturigis aŭtomobilon po 130 kilometroj hore dum Robert dormis. Daŭre veturiganta la aŭtomobilon, David rimarkis nekomprenitajn finnajn anoncojn sur elektronikaj afiŝoj. Finfine, Robert vekiĝis kaj David petis al li tradukon



Tasmaniaj esperantistoj kun esperantisto Adinarayana el Hindujo, ĉe "Dr Syntax"-Hotelo, 22/3/2015



28/11/2015 kun Melanie el Francio. En la fono estas kelkaj el liaj libroj pri lingvoj de lia grandega biblioteko.

de la anoncoj. Robert respondis ke la anoncoj diras ke li ricevos monpunon pro rompo de la rapideclimo, kiu estas po 100 kilometroj hore. Bedaŭrinde okazis la ricevo de la sama monpuno kelkfoje pro la rompo de la sama leĝo. Estus avantaĝo legi la finnan lingvon en ĉi tiu situacio, ĉu ne? David ankoraŭ menciis pri liaj aventuroj al la Granda Murego de Ĉinio dum la mezo de la nokto. Povas esti riska afero, ĉu ne?

Roberto flue parolis multajn lingvojn kaj li havis multajn librojn verkitajn en multaj lingvoj. Unu el la libroj temas pri la paska lingvo kiun la CIA volis havi.

Robert petis al la usona spiona organizo pri kiel ili sciis pri la libro. Ili respondis ke la libro estis menciita en reteja biblioteka listo kiun li konstruis. Estas planite, ke ĉi

tiu valora biblioteko iĝos parto de la MONA-muzeo

James Dwyer, esperantisto el Tasmanio, parolis detale pri Robert kaj lia entuziasmo por subteni Esperanton. Robert ofte gastigis eksterlandajn esperantistojn kaj ĉeestis Esperanto-kongresojn. Okazis tempo kiam li periode instruis Esperanton al malgranda grupo de la Universitato de la Tria Aĝo en biblioteko.

Post la funebro okazis festo ĉe la domo de Robert kaj lia patrino, Adele. Mi renkontis Adele kaj mi menciis ke fotoj de juna Robert montras ke li havas buklan hararon. Adele respondis ke la kialo pro la bukla hararo estas ankoraŭ mistero. Alia stranga afero estas ke dum lia vizito al Eŭropo, kiam li havis proksimume pli ol dudek jarojn, lia hararo rektiĝis.

Multaj homoj ĉeestis la feston kaj ni kantis multajn kantojn el la kantlibroj de Robert.

Robert estis sincera amiko, valorega instruisto kaj faciliganto en la Esperanta movado en Tasmanio.



Juna Robert

La transvivado de kulturoj

DONALD ROGERS (LOWER HUTT)

Wade Davis estas kanada sciencisto, kiu studis la antropologion kaj la botanikon. Li opinias ke la biologia kaj la kultura diversecoj egale gravas, sed estas ambaŭ eroziataj de la samaj fortoj: ŝanĝiĝanta vetero, migrantaj homgrupoj, senarbigado, evoluigado, informada teknologio, internaciaj merkatoj ktp. Li diras: “Nia sinteno kaj konduto malakordas kun tio, kio okazas en la biosfero. Kiel ni atendu, ke homoj respektu arbarojn, se ili ne komprenas pri fotosintezo?”.

Davis pasie subtenas konservadon de la naturmedio, kaj lia mesaĝo pri malaperantaj kulturoj temas pri ŝatado, respektado, kaj kunposedado. Li favoras kulturan transvivadon, ne kulturan konservadon. “Tio estas grava distingo. La unua rekonas la rajton de kulturoj, evoluadi laŭ la propraj dinamiko kaj valoroj, ne laŭ tiuj trudataj el ekstere. Ni serĉu vojon, por ke ĉiuj popoloj ricevu avantaĝon de la genio de moderneco sen la morto de ilia etneco.”

Nuntempe, el la 7000 lingvoj de la mondo, duono ne estas instruata al infanoj. Laŭ Davis, tio estas tragedio, la intelekta ekvivalento de buldozi malnovajn arbarojn. Ŝanĝado estas unu konstanto de kulturo. Oni pensas ke foraj kulturoj estas destinitaj forvelki, kvazaŭ laŭ natura leĝo, se ili ne povas alkonformiĝi al la moderneco. Malvere. En ĉiu kazo, tiuj estas dinamikaj, vivantaj popoloj, kiujn rekoneblaj fortoj eliminadas. Tio estas optimista observo ĉar, se ni homoj estas la agentoj

de kultura detruado, tiam ni povus esti la faciligantoj de kultura transvivado.

La evidentaj kaŭzoj de kultura formortado estas industria kreskado, kaj movadoj politikaj kaj sociaj, ekzemple la marksismo kaj la konsumismo. La problemo ne estas konflikto inter la tradicio kaj la moderneco; temas pri la rajtoj de liberaj homoj elekti la konsistigajn elementojn de siaj vivoj.

Davis ilustras tion per la kazo de la Penanoj de Borneo, al kiuj la registaro de Malajzio altrudis modernajn klinikojn kaj komputilojn, kiel preteksto por fortreni ilin el lando kie ili vivis dum jarmiloj. Nun ili vivas en mizero, kaj iliaj arbaroj estas detruitaj. Kulturo estas pli ol afero de homaj rajtoj aŭ nostalgio. Ĝi vere estas afero pri geopolitika stabileco.

La antropologio lernigas al ni ke kulturo ne estas banala, ĝi ne estas ornamo. Ĝi estas morala kaj etika valoraro, metita ĉirkaŭ ĉiun unuopulon por protekti kontraŭ la barbara koro kiu kuŝas en ĉiuj homoj. La historio montras ke kulturo gravas. Ne temas pri konservado; temas pri la demando en kia mondo ni deziras vivi.

Notoj:

Ĉi tiu artikolo estas adaptita el parto de la artikolo *Going Native* de Jo Chandler, *Cosmos* #63, paĝo 98-106, junio - julio 2015.

Vidu ankaŭ https://en.wikipedia.org/wiki/Penan_people

Ĉu esperantistoj estas mondcivitanoj?

DONALD ROGERS (LOWER HUTT)

De tempo al tempo oni demandas ĉu esperantistoj estas, aŭ devus esti, civitanoj de la mondo. Julio Baghy deklaris: *esti esperantisto signifas ne nur lingvoscion. Ĝi estas destino. Misio. Sopiro al pli bona mondo. Vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas, kaj li estas esperantisto jam antaŭ ol li lernis la lingvon.*¹ Se li pravus, nur denaskaj esperantistoj havus tian sopiron kaj “destinon” plibonigi la mondon. Multaj esperantistoj sentas tian destinon. Baghy malpravus.

Mondcivitano nomas sin homo kiu ligas sian identecon ĉefe al la tuta homaro, malpli al ekzemple la aparteneco al certa nacio.² Temas pri ideo simila al tiu de kosmopolitismo. En tiu senco eble la unua al ni konata famulo, kiu esprimiĝis en tiu senco, estis la greka filozofo Sokrato kiu diris: *Mi estas civitano, ne nur de Ateno, ne nur de Greklando, sed ankaŭ de la mondo.*

Alproprigis la titolon la **Asocio de Moncivitanoj**, organizo kiu laboras en 50 landoj kaj havas sidejon en San-Francisko kaj kunlaboras kun la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia baza dokumento estas la “Manifesto por la vivo”. Ĝiaj ĉefaj celoj estas:

- *kreado kaj gardado de daŭra paco sur la tero, t.e. solvado de diferencoj sen perforto*

- *gardado de la vivo, de la trezoroj de la tero en respondeco por la sekvontaj generacioj*³

Por atingi siajn celojn, mondcivitanoj agadas por starigi tutmondajn leĝojn kiuj donos al individuoj kaj popoloj garantiojn por ilia vivteno, sekureco, libereco, per balotelektoj al **Konstitucia Asembleo de la Popoloj**. La kongreso de la popoloj komencis sian oficialan kaj sendependan vivon en 1977.⁴ Ĝi okazas ĉiun kvaran jaron.³

Ekzistas **Registrolibro de Mondcivitanoj** (kreita en 2003) kiu difinas jene: *Estas Civitano de la Mondo ĉiu homo, kiu rekonas sin membro de la homa komunumo kaj metas la homaran intereson super la apartaj interesoj.*⁴

Esperantista Registrocentro de Mondcivitanoj komencis en 1965.⁴

Kosmopolitismo

Similsenca termino al mondcivitano estas kosmopolitano. **Kosmopolitanismo** estas la ideo ke la tuta homaro apartenas al unu morala komunumo. Por ĝi Tero

estas hejmlando kaj ĉiuj homoj estas kuncivitanoj aŭ mondcivitanoj. Kosmopolitismo povas, sed ne devas, implici ian mondan registaron, aŭ ĝi povas simple referenci al pli inkluzivaj moralaj, ekonomiaj, aŭ politikaj rilatoj inter nacioj aŭ diversnaciaj unuopuloj. Por ili patriotismo kaj naciismo estas malfavorataj. Iuj kritikantoj de la kosmopolitismo opinias ke nacia aparteno gravas por la identeco de homo, kaj ke kosmopolitismo senigas homojn je grava elemento de socia vivplenumiĝo kaj apartenado. Kritikantoj de la morala kosmopolitismo argumentas ke lojaleco al sia lando estas virto.⁵

Kulturo

Estas granda diferenco inter kosmopolitismo kaj **multkulturismo**. La kosmopolitismo premisas ke ĉiu estas libera fari kulturajn elektojn laŭ sia bontrovo. Aliflanke multkulturismo valorigas la konservon de la persona devenkulturo. Multkulturismo supozas ke la diversaj kulturoj kapablas longadaŭre kaj pace najbari unu la alian. Okaze de migrado al nova loko, la devenkulturo de la individuo kunmigras kun li aŭ ŝi.

Ĉu unuopaj mondcivitanoj kaj kosmopolitanoj havas sian propran kulturon? Ŝajne jes, sed ĝi estas diversa ĉe la diversaj homoj.

La kulturo de ekzemple eŭropa esperantisto estas diferenca al tiu de esperantisto en ekzemple Afriko, aŭ en Sudameriko, eĉ se ambaŭ nomas sin mondcivitano.

Filozofo kaj kosmopolitano Kwame Anthony Appiah verkis: *Nia politika kunekzistado, kiel regatoj kaj civitanoj, dependas de nia kapablo interkonsenti pri praktikoj dum ni malkonsentas pri ilia pravigo...Ni povas vivi harmonie sen interkonsento pri bazaj valoroj (krom, eble, la kosmopolita valoro kune vivi)... Konversacio ne necese kondukas al interkonsenta opinio; sufiĉas ke ĝi helpas homojn alkutimiĝi unu al aliaj.*⁶

Referencoj

1. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantistoj>
2. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Mondcivitano>
3. https://eo.wikipedia.org/wiki/Asocio_de_mondcivitanoj
4. http://www.recim.org/dem/pri_esperanto.htm
5. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kosmopolitismo>
6. *Cosmopolitanism – Ethics in a World of Strangers*, Kwame Anthony Appiah, 2006, Allen Lane, Penguin, Londono.

Ateismo nun maldefendebla

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

Respondo al artikolo en *MONATO* (paĝo 25), julio 2011 (*Ateismo eksterscience*)

Ne pro tio ke bahaanoj konsideras sin superaj je kristanoj, islamanoj k.a. rilate pruvojn pri la ekzisto de Dio, sed pro tio ke Jesuo Kristo, Mahometo kaj aliaj Sanktuloj tiuteme malmulton elparolis, ĉar tiutempe apenaŭ unu homo malkredis je Dio(j). Plue, tiuj Disenditoj tiun klarigon lasis al la Sinjoro de la Vinbereco aperonta komence de nia teknologia epoko, 1844:

“Mi havas ankoraŭ multon por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ...” Johano 16:12

Nek oni supozu ke bahaanoj malamas ateistojn. Mia malkomplika kompreno de la *Apokalipso* 3:16 sugestas ke la malŝatataj de Dio fakte estas apatiaj nedecidemuloj. “Tial ĉar vi estas varmeta, kaj nek malvarma nek varmega, mi elsputos vin el mia buŝo.”

Bahá'u'lláh (1817-1892), la Reveno de Kristo kaj samtempe la Imamo Mihdí kaj la Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo, estas dirinta ke ateismo ne plu estas defendebla, alikaze kiel Dio juĝu ĉiun el ni:

Mi perfektigis en ĉiu el vi Mian kreaĵon, ke la boneco de Mia metiado estu plene rivelata al la homoj. Sekve do ĉiu homo povis kaj daŭre povos per si mem aprezi la Belon de Dio, la Glorata. Se li ne ricevintus tian fakulton, kiel oni povus juĝi lin pro lia neatingo? Se,

en tiu tago, kiam estos kunvokitaj ĉiuj popoloj de la tero, iu ajn homo staranta antaŭ sia Dio, devus respondi al: “Kial vi ne kredis je Mia Belo kaj fortunis vin de Mia Memo?”, kaj tiu homo responde dirus, “Ĉar ĉiuj homoj eraris, kaj neniun troviĝis, kiu volis turni sian vizaĝon al la Vero, ankaŭ mi, sekvante ilian ekzemplon, same lamentinde ne rekonis la Belon de la Eternulo,” tia pledo certe ne estus akceptita. La fido de ĉiu homo dependas nur de li mem, neniun alia.

Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh 75 - Postrikoltoj el la verkoj de Bahá'u'lláh

Memevidente kaj memkompreneble mankas fizikaj kaj sciencaj pruvoj ĉar tiukaze fido ne plu estus necesa. Tabuletoj plenaj je pruvoj tamen ne estas mankantaj el la plumo de 'Abdu'l-Bahá (1844-1921). Limigi pruvojn je fizikaj terenoj defias logikon. Al doktoro Auguste Forel (1848-1931), kiu siatempe ekstreme famiĝis, li verkis eseon da pruvoj kies enhavo ĉi tie tro longas. Kiel estu, danke al Lidia Zamenhof, oni facile nun Guglas ĝin. Jen unu ekstrakto por tiuj ateistoj konsiderantaj sin parto de la mondo de naturo. Sed unue permesu komenton de amatoj jene: troa interpretado de gorila konduto ne malgrandigas la homan unikecon. Ĉiu homo sen helpo de filozofo komprenas ĉi tekste la vorton Naturo:

“Se iu supozas, ke la homo estas nura parto de la natura mondo, kaj, ĉar li havas tiujn perfektajn kapablojn,

kiuj estas nur manifestaĵoj de la natura mondo, kaj ke do la naturo estas la origina fonto de tiuj perfektaĵoj kaj ili ne mankas al ĝi, ni respondas al tiu, dirante: la parto dependas de la tuto; parto ne povas posedi perfektaĵojn, kiuj mankas al la tuto.” ‘Abdu’l-Bahá

Jen aldona pruvo de ‘Abdu’l-Bahá al Nobel-premiito plene reproduktita ĉi tie ĉar ĝi estas konciza kaj ne facile trovebla en Interreto:

‘Neniu videbla limo

Proksimume unu jaron antaŭ la Unua Mondmilito okazis memorinda renkontiĝo en Parizo. La fama filozofo Henri Bergson, kiu asertis la principon de la viv-elano (élan vital) en la evoluo, jam petis intervjuon kun ‘Abdu’l-Bahá en ties ĉi hotelo, kaj tio estis permesita. Bergson iris al la hotelo kun pluraj el siaj ‘disĉiploj’. Bonvenigis ilin ‘Abdu’l-Bahá, kiu mem verŝis la teon, kaj poste invitis Bergson ekkonversacii. Sed la filozofo diris, ke decas, ke la gastiganto ekigu ĝin. Do ‘Abdu’l-Bahá komencis per la rimarkigo, ke la diferenco inter materiistoj kaj la di-kredantoj estas tute ne same granda, kiel oni kutime supozas.

La materiistoj konfesas, ke la homo ankoraŭ ne komprenas la realon de la aferoj, ĉar se li tion farus, ne plu estus eblo progresi. Ekzemple, se la esenco de fero estus komprenita en sia tuta amplekso, maleblus ĉia plua progreso en la kampo de metalurgio. Sed efektive ni ĉiutage alfrontas novajn nekonataĵojn kaj devas akiri novan scion sur la kampo de nia sperto. La di-kredantoj asertas, ke estas ĉio-ampleksa realo nekomprenebla al la homo, forto nomata dia. Se oni postspurus tiujn du vidpunktojn ĝis

ilia logika konkludo, oni vidus, ke ili ne malproksimas unu de la alia.

Bergson respondis ridetante ke, se ‘Abdu’l-Bahá deziras trovi tian komunan terenon de la du partioj, li ne protestas. ‘Abdu’l-Bahá diris ke, kiam oni juĝas iun diskuteron, oni permesu, ke justeco gajnu: Bergson imagu sin staranta ĉe la bordo de senlima oceano, nescianta ĉion, kio estas en la oceano, aŭ kiel granda ĝi estas; li prenu el ĝi glason da akvo, gustumu ĝin kaj konstatu, ke ĝi estas sala; ĉu li povus tiam aserti, senkonsidere de ĉio ekster lia sciopovo, ke en tiu vasta oceano ne estas salo? Bergson iom cerbumis kaj cedis, ke neniu povus fari tian aserton.

‘Abdu’l-Bahá daŭrigis, dirante, ke ni estas en mondo, kiu estas eta parto de la senlima universo, senpovaj ĉion esplori kaj nesciantaj, kiaj vivspecoj ekzistas. Se ni rigardas la homon parto de la neimageble granda Estoregno, ni trovas, ke li havas pensopovon kaj volon. Sed se ni trovas pensopovon kaj volon en homaj individuoj, ĉu estas valide nei la eblon, ke la Unua Kaŭzo, el kiu la homo devenas – ĉu ni nomu ĝin la Naturo aŭ Dio – ankaŭ posedas pensopovon kaj volon?

Valíyu’lláh Varqá, bahaano, kiu ĉeestis tiun intervjuon, kiu rakontis pri ĝi al mi du fojojn, raportis, ke post tiuj vortoj de ‘Abdu’l-Bahá regis kompleta silento en la ĉambro dum kelkaj minutoj. Tiam Bergson, profunde impresita, diris, ke surprizas lin, ke estas tiel simpla klarigo de tiel malfacila demando. Li leviĝis, klinis sin, kaj kisis la manon de ‘Abdu’l-Bahá antaŭ ol ekiri. Liaj kamaradoj same agis.

The Heavens are Cleft Asunder (La

ĉieloj disfenditas) de Hushmand Sabet.
'Abdu'l-Bahá ofte eksplikis la rilatatan temon al evoluado kaj la origino de specioj.

Bonvolu tiujn rete akiri senpage:
Pariza Paroladoj kaj Respondoj kaj Demandoj.

(Bela koincido kuŝas en tio ke foliumante vi trovos referencojn tie por helpi min esperantistigi estraranojn de Bahaismo. Nepras bedaŭrinde ke vi nun faros tion en via nacia lingvo.) Ke la dia ĉi-planede vivplano estas disvolvigita per evoluo kaj natura selektado, ne estas

neita aŭ dubita de bahaanoj.

La plej elstarajn pruvojn mi listigas apud la fino. Serĉantoj de la vero sufiĉe facile trovos en la gepatra lingvo volumojn de Bahá'u'lláh mem ĉe bahaaj grupoj tra la mondo:

Tablets of Bahá'u'lláh - Tabuloj de Bahá'u'lláh, p.140-143, *The Seven Valleys* - (La Sep Valoj), p.32-33. La unua principo de la Bahaa Kredo estas sendependa enketado pri la vero per si mem – sekve ateismo iĝas nedefendebila.

Anoncoj

AEA nun refoje estas asocio

Post longa pritrakto, ni feliĉas anonci, ke la Aŭstralia Esperanto-Asocio nun refoje oficiale estas asocio. Jen parto de la ĝojportanta letero:

Dear Sir/Madam,

Declaration of transfer of registration under s601AL of the Corporations Act 2001

THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION LIMITED
ACN 121 495 789

The application for transfer of registration of the above company is approved.

La mistera foto

En la lasta numero de ESK aperis ĉi tiu foto. Do, kie estas la busto de Zamenhof?

Respondo: en parko apud la urbcentro de Vieno, Aŭstrio.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, David
Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.